



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 14/1976 - 1 aprilo 1976
Aperas ĉiusemajne

Subtenu la
porleprulan
agadon kaj
UNICEF !
Legu detalojn
sur p. 3

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Salutvorto

de la ĉefurbestro de la urbo Augsburg okaze
de la Germana Esperanto-Ekspozicio 1976
=====

Sur la plej diversaj niveloj kaj per multflankaj agadoj oni hodiaŭ klopodas en la tuta mondo pri paca kunestado de la popoloj. Sed, kiel ĉiutage montriĝas en vorto, skribo kaj bildo, la realco ofte diferencas de ĉi tiuj idealoj.

La mankanta kompreniĝo inter la popoloj certe ankaŭ devenas de tio, ĉar diversaj lingvoj estas parolataj de la homoj. Por ŝanĝi ĉi tiun dilemon servas en speciala grado la Esperanto-movado. Ĝi disvastiĝis sur la tuta terglobo dum la pasintaj naŭ jardekoj kaj registras kelkajn milionojn da virinoj kaj viroj.

En Augsburg ni povas noti multjaran tradicion. Jam en 1908 estis fondita en nia urbo la unua Esperantogrupo kaj ĉi tie okazis jam en 1910 internacia kongreso de la Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ hodiaŭ la Augsburgaj esperantistoj estas tre aktivaj kaj faris intiman amikecon kun multaj samideanoj en la tuta mondo.

Kun la esperantistoj en niaj ĝemeligaĵaj urboj Amagasaki en Japanio kaj Bourges en Francio la membroj de la ĉi-tiea grupo flegas viglajn personajn kaj skribajn kontaktojn. Per tio ili kontribuas al viva kreado de amikaj rilatoj.

Tiele nia urbo certe estos la ĝusta loko por la ĉi-jara Germana Esperanto-Ekspozicio. Volonte ni por tio disponigis la urbodomon. Mi estas konvinkita, ke la ekspozicio renkontos la intereson de niaj civitanoj. Mi ĝojus, se la Esperanto-movado per tio povus gajni novajn amikojn kaj membrojn.

Augsburg, la 9-an de marto 1976

sign. Hans Breuer

Adiaŭo de K. Kalocsay

Budapeŝto (pp/hb) - La lasta adiaŭo de Kolomano Kalocsay okazis la 25-an de marto 1976 ĉe la familia tombejo en Máriabesenyő apud Gödöllő. Dum la adiaŭa ceremonio salutis hungarlingve la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, József Máteffy, kaj kuracisto-profesoro de la László-hospitalo, kie Kalocsay longtempe laboris kiel kuracisto. Por Universala Esperanto-Asocio parolis en Esperanto s-ro Rotkvič el Jugoslavio. Adiaŭan saluton ankaŭ parolis la plej malnova UEA-membro en Hungario, Johano Lévai.

Kantojn prezentis ĥoro de la László-hospitalo. Multaj belaj florkronoj ornamis la tombon.

Zamenhof-memorkunveno

Vieno (pp) - Sabate, la 10-an de aprilo je la 15,45 horo okazos Zamenhof-memorkunveno en Vieno, Börseplatz antaŭ la Zamenhof-monumento kaj je la 16,30 horo en La Pola Instituto, Am Gestade 7.

Esperantista printempo

Koszalin (pp) - Pola Esperanto-Asocio - Filio en Koszalin kunagante kun Koszalin Soci-Kultura Societo organizas de la 16-a ĝis la 20-a de majo 1976 la "Ĉebaltan Esperantistan Printempon" en Mielno, ĉamara ripozloko apud Koszalin.

El la programo: promenadoj laŭ mara bordo; aŭtobusaj ekskursoj; distraj vesperoj; renkontiĝo kun redaktoroj de Pola Radio kaj Pola Esperantisto; kolbasrostado ĉe la bivakfajro; lingvoperfektigado gvidata pere de A. Pettyn.

La kotizo por 5-taga restado de 500 zlotoj inkluzivas loĝadon, manĝaĵojn kaj ĉiujn programerojn.

Aliĝoj atingu la organizantojn ĝis la 20-a de aprilo. Petu informojn de Organiza Komitato de Ĉ E P, poŝtkesto 30, PL-75-950 Koszalin, Pollando.

Turisma Esperanto-Kalendaro

Bydgoszcz (pp) - Jus aperis la eldono de TURISMA ESPERANTO KALENDARO 1976, eldonaĵo de Monda Turismo - Turisma Servo de TEJO. La plaĉa broŝuro entenas detalojn pri 124 internaciaj Esperanto-aranĝoj, el kiuj okazas: 48 en Pollando, 21 en Bulgario, 19 en Hungario, 13 en Ĉeĥoslovakio, 5 en Aŭstrio, 4 en Francio, po 3 en Grekujo kaj Belgio, 2 en Hispanio kaj po 1 en Brazilo, FRG, GDR, Jugoslavio, Nederlando kaj Svisujo.

La eldonantoj, Pola Esperanto-Asocio, Bydgoszcz-Gdańsk-Warszawa, petas jam nun sendi informojn por Turisma Kalendaro 1977 nepre ĝis la 10-a de novembro 1976.

La kalendaro estas ricevebla kontraŭ 2 internaciaj respondkuponoj ĉe Klubo "Esperanto", str. M. Curie-Skłodowskiej 10/4, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Esperanto-Societo en Bitola

Bitola (pp) - En Bitola, laŭ grandeco dua urbo en PR Makedonio, okazis la 14-an de marto fondkunveno de nova Esperanto-societo. Ĝi estas la oka Esperanto-societo sur teritorio de Makedonio. La fondo-kunvenon partoprenis 60 personoj. En la nomo de Makedonia Esperanto-Ligo salutis la kunvenon ĝia prezidanto Dime Bojanoski-Dize, eksministro el Skopje. La societanoj en sia programo enmetis interalie la punkton pri pliperfektigo en la lingvoscio por povi fine de julio akcepti kaj gvidi tra la urbo la ekskursantojn de la 20-a Kongreso de jugoslavaj esperantistoj, kiu okazos en Prilep. (mĝ)

Novaĵoj el Paderborn

Paderborn (pp) - Eŭropa Klubo kaj Junulara Esperanto-Grupo Paderborn semajnfine de la 20-a - 21-a de marto okazigis libertempadon por lernantoj, kiuj nun lernas Esperanton, en la junular-gastejo Bad Driburg. Ĉeestis 25 lernantoj.

En la semajno de la 5-a ĝis la 10-a de aprilo Eŭropa Klubo okazigas intensan Esperanto-kurson por gepatroj, kies infanoj nuntempe lernas Esperanton. Iniciatita tiu kurso estis de kelkaj anglaj gepatroj, kies infanoj en la angla lernejo lernas Esperanton. Kursgvidanto estas Jim Cushing, usona politologo, kiu nuntempe laboras en la oficejo de la Eŭropa Klubo.

Gazeta debato

Parizo (pp/lgtx) - En kvin sinsekvaj numeroj, la revuo "30 Jours d'Europe" publikigis leterojn de legantoj pri lingvaj problemoj kaj Esperanto. Du kromaj kontribuoj aperis en la marta numero.

Laborgrupo por UNICEF

Westerland/Sylt (pp) - Sur la insulo Sylt, la plej norda kaj granda germana feria insulo, estis fondita loka laborgrupo de UNICEF, la porinfana helporganizo de la Unuiĝintaj Nacioj. La iniciatintoj estas esperantistoj.

Ĉefa celo estas la vendado de la bonkonataj kaj arte valoraj UNICEF-salutkartoj. La nova kolekcio estas ekde nun je dispono. Interesuloj petu senkoston prospekton pri la UNICEF-salutkartoj de UNICEF SYLT, Renate Brinkmann, D-2280 Westerland/Sylt, Bastianstr. 8

Nova serio de glumarkoj por lepruloj

Neuwied (pp) - D-ro Josef Kondor informas, ke la unua serio de la glumarkoj favore al la porleprula agado elĉerpiĝis, kiu donis netan gajnon de 3000 GM por la lepruloj.

Nun aperis dua eldono en kvanto de 120 000 ekzempleroj sur 3750 folioj. 1 folio kostas 2,- GM.

Mendojn akceptas: D-ro Josef Kondor, Alte Schloß-Str. 25, D-5450 Neuwied.

De Oriento al Okcidento

Zagrebo (pp/mĝ) - Ĝus aperis kompendio de Esperanto-literaturo kiun la pioniro de la Esperanto-movado en Slovenio, J. Kozlevĉar, kun abela diligenteco kunmetis dum eble unu jardeko. Temas pri legaĵo elektita de 160 diversaj aŭtoroj kun enhavolisto, komentarioj pri la verkoj, el kiuj estas ĉerpitaj la legaĵoj; bibliografio de Esperanto-revuoj kaj gazetoj el kiuj devenas parto de legaĵoj; biografio de verkistoj kaj tradukistoj kaj aboca listo de aŭtoroj. La kompendio aperis en nur 350 ekzempleroj, ofsetite.

Bibliografiaj notoj: Jose Kozlevcar, De Oriento al Okcidento.

Internacia legolibro por la perfektigaj kursoj de Esperanto. Kompendio de Esperanta literaturo. Kuneldonis: Slovenia Esperanto-Ligo kaj Kroatia Esperanta Junulara Asocio, Zagreb 1976 236 p., 20,5 x 21,5 cm. Prezo 14,- n. gld.

Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj

Vieno (pp) - Radio Vieno disaŭdigis en sia pasinta semajnfina Esperanto-elsendo artikolon de Harald Rader pri la "Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj", el kiu ni citas:

"Antaŭ 14 jaroj fondiĝis en Vieno la 'Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj' kiel parto de la aŭstria blindul-asocio "Österreichischer Blindenverband".

La taskoj de la Ligo estas: disvastigi nian lingvon internacian inter la blinduloj de la tuta respubliko Aŭstrio, instrui la lingvon per kursoj rekte aŭ sonbende, havigi legaĵojn brajlajn aŭ sonbendajn, zorgi por la internacia kompreno, kontaktigi kun la esperantista mondo kaj tiel plu. Krom la internacia gazeto "Esperanta Ligilo" kaj kelkaj aliaj periodaĵoj, ĝi havigas al siaj membroj la svisan sonrevuon "Amika Voĉo" kaj multajn sonbendojn parolatajn en Esperanto, lernolibrojn kaj literaturon en Esperanto....

La Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj nun ankaŭ havas sian propran sonrevuon sub la titolo "Heroldo de Aŭstrio". Montriĝis, ke precipe por la nevidantoj mankas la kontakto kun aliaj esperantistoj. Tial oni decidis aperi sonrevuon kun kontribuoj el Aŭstrio, sed ankaŭ el eksterlando. Estas ekore dankinde, ke Radio Vieno disponigas por tiu sonrevuo siajn Esperanto-elsendojn, kiuj multe pliriĉigas ĝin..."

Esperanto en Radio

10 000 el Varsovio

La 9-an de majo 1976, je la 16,30 horo, okazos la 10 000-a Esperanto-elsendo de la Pola Radio. Tiu unika jubileo certe estas kaŭzo por gratuli al la Esperanto-Redakcio. Skribu do karton aŭ leteron al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Statistiko el Varsovio

La ĉiusemajna statistiko pri la korespondaĵoj de aŭskultantoj okupas pli kaj pli la aŭskultantojn de Pola Radio. Tiele ĉiu semajna leter-kesto alportas la plej novajn donitaĵojn. Pilo-Press denove prezentas kelkajn el ili.

En la semajno de la 18-a ĝis la 24-a de marto alvenis en Varsovio 113 korespondaĵoj, kaj en la posta semajno, do ĝis fine de marto, alvenis 87 korespondaĵoj. Interesa estas ankaŭ la rezulto en la unua jarkvarono. De la 1.1. ĝis la 31.3.76 envenis entute 1 560 korespondaĵoj. (Pasintjare venis en la sama periodo 1 351, do fakte estas kresko de 209 korespondaĵoj). Al tiu bona rezulto kontribuis speciale 10 "kolonoj", kiuj parte skribis pli ol 100foje en la unuaj tri monatoj. Estas interese, ke inter tiuj 10 plej skribemaj aŭskultantoj troviĝas nur du el okcidentaj landoj (FRG kaj Anglio), dume la aliaj ok devenas de socialismaj landoj, el kiuj tronas je la pinto GDR.

Radio Bervalio respondas....

Demando: Ĉu la poloj kaj la germanoj nun formas unu popolon?

Respondo: Teorie jes, almenaŭ laŭ Pilo-Press, kiu skribis en sia numero 12/1976 pri "repaciĝo inter la pola kaj germana popolo."

Radio Romo. Sub malfacilaj cirkonstancoj estis aŭdebla Radio Roma pasint-dimanche. Renato Corsetti, la nova parolisto, parolis i.a. pri "Sardinianoj volas disiĝi el Italujo", vere interesa artikolo, aperinta en la ĵurnalo "Il Corriere Della Sera" la 4.3.76. Jen mallonga citaĵo: "Sardinianoj...devas ĉesi ŝajnigi sin italoj kaj honti paroli sian lingvon: ili devas retrovi la konscion de sia nacia identeco."

Svisa Kurtonda Servo. Ankoraŭ daŭras la du serioj pri la reto-romanĉa lingvo de d-ro A. Baur kaj pri la instruado de nacia lingvo pere de Esperanto de ges-roj Gacond.

Radio Vieno. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher denove sin okupis pri la problemoj de la slovena minoritato en Sud-Karintio.

Jen ni citas: "Pasintan semajnfino kanceliero d-ro Bruno Kreisky vizitis la komunumojn de nia slovena minoritato en Sud-Karintio. Li bedaŭris la nekomprenebla rifuzan sintenon de ties reprezentantoj rilate al la proponita statistika kapnombro en la lingve miksitaj regionoj.

Surbaze de tia nombrado dulingvaj voĵmontriloj estu starigotaj en komunumoj kun minimume dudek-kvin-procenta slovena minoritato. Tiel la sola ankoraŭ neplenumita paragrafo de la ŝtatkontrakto povus fine esti plenumata. Kial tiu problemoj ne jam delonge estas solvita? Ĉar ĉiuj politikaj partioj timas, ke - per kiom ajn enmiksiĝo favore al la minoritato - ili povus perdi tro da voĉoj el la karintia plimulto..."